ŝi. Kun granda miro ŝi mem rimarkas la misteron, ke per maturiĝo ŝi aliiĝas, ŝia karaktero formiĝas, ŝi rigardas homojn kaj aferojn en nova kaj pli tolerema maniero. Ŝi fariĝas pli memstara. Konscie ŝi penas kunhelpi tiun evoluon en kio ŝia kapablo rigardi sin mem, ŝia memkritika sinkono ŝin helpas. Ŝi ekesperas: „Tiom longe kiom oni povas ankoraŭ vidi la freŝe bluan ĉielon, tiom longe oni povas trovi konsolon por ĉiu malfeliĉo". — Kaj tiam la ĉielo ŝin kompatas kaj benas. Interne de la muroj de mallibera trivialeco ĝi malfermas sin al ŝi en hela kaj varma grandeco: la unua amo. Bele, delikate kaj tamen tute senkaŝe konfidas Anne al ni la evoluon inter ŝi kaj Peter, la juna filo de v. Daan, pri timemaj sopiroj kaj dolĉaj momentoj de tenera intimo. Kontraste al ĉio mizera ĉirkaŭ si ŝi spirite kreskas kaj floras — eĉ post la elreviĝo.

La Taglibro parolas al ni ĉiuj. Sed en unu aspekto ĝi tuŝas problemojn ĉiam aktualajn al gepatroj, pedagogoj kaj infanoj samaĝaj kun Anne. Fakte estas tre malofta kaj tial tre valora okazo, kiun donis al ni Anne per siaj konfesoj, por pli bone kompreni ĝuste infanojn de pubereca periodo, kiuj al plenkreskuloj ĉiam restis problemo. Sendube la eksterordinaraj cirkonstancoj, la limigitaj vivkondiĉoj kaŭzis ĉe Anne kaj pliakriĝon de la malfacilaĵoj kaj ankaŭ pli profundan maturiĝon, sed baze, esence ŝiaj problemoj estas la samaj kiel tiuj de ĉiuj infanoj de ŝia aĝo. Ni, plenkreskuloj, forgesis kiel ni mem pensis kaj agis tiutempe, kaj tial malfacile interrilatas kun infanoj. Anne helpas nin — de interne ni vidas ŝiajn problemojn kaj komprenas. Kaj la infanoj, kiuj same kiel Anne en tiu tempo ĝuste abomenas sin mem kaj tial reagas provoke, trovas konsolon kaj stimulon per ŝia anima barakto survoje al si mem.

Tra la tuta libro impresas emocie la kreskanta personeco de Anne, jen ĝoja, petolema, preta per bonhumoro percepti eĉ trivialaĵojn, jen serioze pensanta, afliktita, malfeliĉa, jen energie studanta. Kortuŝas ŝia anima barakto kontraŭ soleco, kontraŭ ĉio malbona en ŝi mem, kaj ŝia energia strebado al memstareco. Spite al ĉio ŝi iom post iom certiĝas, ke ŝia vivo havas sencon kaj celon. Ŝi havas planon kaj fortavole laboras por ĝi. Ŝi volas esti ĵurnalistino, verkistino — ŝi deziras krei, verki por pluvivi, ankaŭ post sia morto. Vivĝojo, pozitiveco en ŝia tuta sinteno:

„Mi estas juna kaj posedas ankoraŭ multajn latentajn kapablojn. ...Mi estas multe dotita: per feliĉa naturo, per gajeco kaj per forto. Ĉiun tagon mi sentas, kiel kreskas mia interno, kiel alproksimiĝas la liberiĝo, kiel bela estas la naturo, kiel bonaj estas la homoj en mia proksimo, kiel interesa estas ĉi tiu aventuro. Kial do mi estus senespera?"

Ethel Hansen.



= 089.2 = 061.239(100){(058.2) + (05)}„1959"
E 066(058) + G1E

## IMPONA JARLIBRO KAJ PLIGRANDA „ESPERANTO" EN LA JUBILEA ZAMENHOF-JARO

Aperis la Jarlibro de U.E.A. por la jaro 1959. Tiu ĉi unua parto havas 544 paĝojn kun riĉega enhavo. Ĝi estas la plej granda, la plej kompleta kaj varienhava Jarlibro en la tuta historio de U.E.A.

Estas maleble prezenti komplete la enhavon de tiu impona publikaĵo. Jen nur kelkaj eroj: antaŭparolo de Inĝ. L. K. Zaleski-Zamenhof, la nepo de D-ro L. L. Zamenhof; informoj pri la Zamenhof-Jaro; informoj pri la Komitato, HPK, Estraro, oficejoj, servoj de U.E.A. kun grafikaĵoj pri la Centra Oficejo, informaj fakaj kaj CED; listo de ĉiuj organizaĵoj, honoraj prezidantoj, honoraj membroj, dumviva membraro kaj patronaro; membroj de la Akademio; listo de denaskaj esperantistoj; informoj pri ĉiuj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj; listo de la novaj Esperanto-libroj kaj de la tuta Esperanto-gazetaro; Statuto kaj Reguloj de U.E.A.; ĉefdelegitoj kaj delegitoj k.t.p. Ĉi-foje la Jarlibro enhavas ankaŭ liston, aranĝitan laŭ la landoj kaj lokoj, de tiuj lokaj Esperanto-societoj, kiuj sendis kaj pagis la koncernan anonceton. La nombro de reklamoj estas eksterordinare granda. Multaj estas ilustritaj. Laŭlanda resumo de la delegitaro montras, ke U.E.A. havas nun 2.760 delegitojn kaj fakdelegitojn (pasintjare 2.539).

Ankaŭ la organo de U.E.A. „Esperanto" fariĝis en tiu ĉi jaro ankoraŭ pli granda. Ĝi havas nun en ĉiu numero 4 pliajn paĝojn, nome 20 plus 4 paĝojn de la kovrilo, entute 24 paĝojn. Entute aperas 11 numeroj ĉiujare, kio signifas ke ĉiu abonanto ricevas 264 grandformatajn paĝojn kun varia enhavo.

La Jarlibron kaj la oficialan organon de U.E.A. ricevas ĉiu membro-abonanto. Kvankam ankaŭ la nombro de membro-abonantoj kreskis kompare kun la antaŭaj jaroj, tamen ankoraŭ multaj esperantistoj ne estas individuaj membroj de U.E.A. La gvidaj instancoj de U.E.A. klopodas ĝis maksimumo ne nur disvastigi la lingvon en la mondo, sed ankaŭ doni al la membraro gravajn publikaĵojn kaj multnombrajn servojn. Ili atendas, ke tio trovos ehon inter la tutmonda esperantistaro. Precipe en tiu ĉi Jubilea Zamenhof-Jaro devus troviĝi eĉ ne unu esperantisto aŭ esperantistino en la mondo, kiu ne estas individua membro de U.E.A., laŭ la ebleco membro-abonanto aŭ, ankoraŭ pli bone, membro-subtenanto.

*Helpu al plua fortikigo de U.E.A.! Utiligu la multnombrajn avantaĝojn, kiujn havas individua membro de U.E.A.! U.E.A. havu en la Jubilea Jaro 1959 almenaŭ 10.000 individuajn membrojn kaj almenaŭ 30.000 membrojn entute! Memoru, ke U.E.A. bezonas vin kaj vi bezonas U.E.A.!*

D-ro Ivo Lapenna, Ĝenerala Sekretario de U.E.A.
(Adreso de U.E.A.: Eendrachtsweg 7, Rotterdam, NEDERLANDO).